nia voĉo

madrida esperanto-liceo marto 2020

## VIZITO AL LA INSTITUTO TORRES QUEVEDO

La 10an de februaro grupo de esperantistoj vizitis la ekspozicion pri la inĝeniero, inventisto kaj esperantisto Leonardo Torres Quevedo, montritan en la "Instituto de Tecnologías Físicas y de la Información Leonardo Torres Quevedo" (ITEFI), esplor-centro apartenanta al CSIC. Ni havis la ŝancon esti gvidataj ankaŭ al alia ekspozicio pri historiaj instrumentoj uzitaj en sciencaj esplorcentroj, kelkaj devenantaj el antaŭ pli ol jarcento, kaj kiujn oni konservis kaj montras en vitroŝrankoj de la instituto.



La ekspozicio jam estas fermita, sed dum la monato marto oni muntos alian pri Torres Quevedo kaj la direkteblaj balonoj (oni en tiu ĉi kazo ne devas uzi la nomon *zepelino*, ĉar la balonoj inventitaj de Torres Quevedo estis malsamaj de tiuj disvolvitaj de la grafo Zeppelin). Ĝi estos vizitebla ekde la 4a de marto en la sama loko, strato Serrano 144.

Alia ekspozicio vizitinda dum monato marto havas flankan rilaton kun Esperanto: tiu dediĉita al la "Skolo Cajal: Havaĵo de la Neŭroscienco", kiu omaĝas la skolon kreitan de la nobelpremiito Santiago Ramón y Cajal, kun atento al ties disĉiploj. Unu el tiuj aluditaj estis lia propra frato, Pedro Ramón y Cajal, esperantisto. La ekspozicion eblas viziti en la Korporacio de Medicinistoj de Madrido (Colegio de Médicos, strato Santa Isabel, 51)

## ELMONTRADO DE ESPERANTO EN EKSTERAJ RONDOJ

Dum la monato februaro okazis diversaj prezentoj de Esperanto en eksteraj medioj.




La 12an de februaro, okaze de la "Tago de Darvino" (t.e. la celebrado de la naskiĝtago de Charles Darwin, la disvolvinto de la teorio de la evoluo), la Nacia Muzeo pri Natursciencoj organizis diversajn agadojn, inter kiuj publikan laŭtlegadon de pecoj de verkoj de tiu sciencisto. Inter ili partoprenis la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio, kiu laŭtlegis la unuan paragrafon de "La origino de specioj", en Esperanto (en la apuda foto, en la malfono).

La 20an de februaro, José Antonio del Barrio prelegis en la CIEM (Iberia Centro por Studo pri Framasonaro), pri la temo "Esperanto kaj Framasonaro – Esperantistaj Framasonoj", laŭ la invito de la liberalaj framasonaj loĝioj, en la nova sidejo de tiu organizaĵo.

La 27an de februaro Del Barrio prelegis ankaŭ en Espacio Olmo (*Spaco Ulmo*), kultura institucio ligita al la politika maldekstro en la strato Olmo, en la madrida kvartalo Lavapiés, pri "Esperanto en la historio de la laborista movado".

La 29an de februaro Miguel Fernández partoprenis en nova prezentado de "Poetas por el Clima" (Poetoj por la klimato), post tiu unua okazinta la 29an de septembro pasintjare, en la studioj de Radio Utopía. La verkistino kaj aktorino María Victoria Caro Bernal, kiu gvidas babilrondon nomatan *Tertulia de las Tres Tertulias* en Ateneo de Madrid, vokis la partoprenintajn poetojn al nova prezentado de siaj poemoj por la defendo de la klimato, kadre de la de ŝi gvidata babilrondo. Dum ĝi Miguel voĉlegis refoje sian poemon, kiu, aliflanke, jam aperis en la papera kaj reta versioj de la ekologiisma revuo "Eco del Parque".

## ALPROKSIMIĜAS LA KONGRESO EN COMILLAS

Finiĝas la dua aliĝperiodo por la 79-a Hispana Esperanto-Kongreso, okazonta en Comillas (Kantabrio) de la 30a de aprilo ĝis 4a de majo 2020, kaj jam pli ol 120 homoj enskribiĝis en tiu evento, kiu certe gastigos proksime al ducent esperantistoj el pluraj landoj.

Oni diskonigis jam la muzikan programon, tre altiran kaj krome malferman al la loka publiko. Ene de ĝi ni povas rimarkigi la partoprenon de madridano Miguel Fernández, kiu gvidos poezian-muzikan spektaklon (ANTOLOGIE) surbaze de novaj kantoj kaj deklamoj de poemoj el ĉiuj liaj poemaroj jam publikigitaj kaj de poemoj iam publikigotaj. Ĝi taŭgos kiel prezento de *Semilla de arrebol*, hispanlingva antologio el ĉiuj liaj poem-kolektoj jam publikigitaj kaj de poemoj iam publikigotaj, en lia propra hispanigo, eldonota de eldonejo Calumnia.

Krome, oni jam anoncis la partoprenon de la kataluna grupo Kaj Tiel Plu, la tuluza artisto JoMo kaj la itala kantisto Kjara (Chiara Raggi), unuafoje koncertonta en Hispanio. Ankaŭ prezentiĝos muziko kaj dancoj tipaj de la regiono Kantabrio.

La organizantoj anoncis ankaŭ la turisman programon, kun ekskursoj al la mirinda groto El Soplao la 30an de aprilo, kaj ekskurso al la urboj Santandero kaj Santillana del Mar la 4an de majo, sen forgesi la grandan belecon de Comillas mem, kun monumentoj kiel la Pontifika Universitato, la Palaco de Sobrellano aŭ la fama Kaprico (Capricho) de Antoni Gaudí. Ne forgesu ankaŭ la postkongresan ekskurson laŭ la marborda Jakoba Vojo. Ni rekomendas ke vi rezervu baldaŭ, ĉar kelkaj el la ekskursoj disponas nur je limigita kvanto da lokoj.

Vizitu la retejon: http://www.esperanto.es/kongreso, por koni la ceteron de la programo, kaj pliajn praktikajn detalojn, inklude de la aliĝmaniero.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

Kutimaj ĉiusemajnaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie. La unuasabata renkontiĝo okazos la 7an de marto, je la 6a horo vespere, en Medialab-Prado, kiel kutime lastatempe.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com